

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Sempagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkaj
direktoro, Kaunas.

N-o 172
30. 12. 1923

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Vi restos fidelaj!

Devenante el familio de presistoj-gazeteldonistoj kaj havante mem la saman profesion, mi revis pri la eldonado de grandformata, ofte aperanta Esperanto-jurnalo preskaŭ de la momento, kiam mi eklernis Esperanton. Tio estis en la jaro 1910. Tiam mi estis entuziasma junulo, sed mankis al mi sufiĉa sperto. Tro tio mi rezignis provizore je la realigo de mia plano. Sed kelkajn jarojn poste, nelonge antaŭ la komenco de la mondmilito, mi denove ekprenis la planon kaj preparis ĉion por la eldonado: mi petis ofertojn pri Esp. literoj, pri klišaĵo por titolo ktp. La eksplodo de l' milito malhelpis la eldonadon.

Tamen la revo pri la grandformata kaj ofte aperanta Esperanto-jurnalo restis en mi viva kaj ne lasis min. Tial — apenaŭ kiam la milito ĉesis — mi meditis denove pri ĝia efektiveco. Kvankam la necerta situacio en la okupita teritorio, la disorganizigo de la Esperantistoj (pro la milito) kaj aliaj malfavoraj cirkonstancoj estis defimigaj, unu cirkonstanco helpis min: tio estis la altiĝo de la kurzo por eksterlandaj valutoj en Germanlando. Dolaro, ŝilingo, franko subite atingis eksterordinaran valoron kompare al la germana marko, kvankam la enlandaj prezoj nur malmulte ŝanĝiĝis. Sur tiu ĉi cirkonstanco precipe, sed ankaŭ sur mia propra idealismo kaj sur tiu de la samideanoj mi ekkonstruis la konstruaĵon de ET. Nature min helpis ankaŭ mia fakkono kiel presisto kaj la posedo de propra presejo. La fundamento de ET do ne estis tre forta, kiel oni vidas, sed mi kalkulis ĝuste, kaj la eksperimento sukcesis.

La unua duonjaro de ET kompreneble estis malfacila, sed la eldonado plifaciliĝis kun la progresanta pligrandigo de la abonantaro kaj la same progresanta plivalorigo de la eksterlandaj valutoj en Germanlando: ĉar la prezoj sekvis nur malrapide la malplivalorigon de la marko, kaj kiu disponis pri eksterlandaj monvaloroj, tiu povis ĉiam utiligi la plej favorajn prezojn. Tiamaniere en la jaroj 1921 kaj 1922 la enspezoj el ET plene sufiĉis por kovri la elspezojn.

Ankaŭ la unuaj ok monatoj de la jaro 1923 estis kontentigaj. La vizitintoj de la Dekkvina Kongreso certe rememoras, ke dum la kongresa semajno kaj ankaŭ tiu poste ili vivis en Germanlando tre malkare. Nur je la fino de l' monato aŭgusto la cirkonstancoj komencis ŝanĝiĝi senteble. Kaj tiu ŝanĝiĝo okazis eĉ tiel subite, ke ĉiu estis surprizita. La prezoj altiĝis tuj je la trioblo aŭ pli, laŭ ora valuto. En la sekvantaj monatoj la plikarigo daŭrigis kaj atingis sian kulminon en la fino de novembro kaj komence de decembro. En tiuj tagoj la ekonomiaj cirkonstancoj en Germanlando kaj precipe en la okupita teritorio estis vere teruraj. Jen kelkaj ekzemploj: veturo en tramo kostis en Köln 350 miliardojn, kiam la dolaro valoris foje malpli ol kvar bilionojn (t. e. por unu tramveturo oni devis pagi egalvaloron de du belgaj frankoj aŭ duona svisa franko), unu 4-paĝa numero de „Kölnische Volkszeitung“ kostis je la sama tempo 300 miliardojn, unu simpla tagmanĝo en restoracio 4—5 bilionojn (5—6 svis. fk.) ktp. Kvankam en la lastaj semajnoj la cirkonstancoj iomete pliboniĝis, ili tamen restas tute eksterordinaraj.

Kompreneble, tiuj malfavoraj cirkonstancoj ankaŭ influas ET. Depost la kongreso de Nürnberg la enspezoj jam ne sufiĉas por kovri la elspezojn. Tio estas ne pli ol la nuda fakto, certe tre bedaŭrinda, sed provizore ne ŝanĝebla. Mi scias, ke la nunaj cirkonstancoj ne daŭros, kaj mi estas preta, kune kun miaj kunfirmantoj oferi dum tiu ĉi kriza transira tempo; tamen tiu ofero ne devas esti tiel granda, ke ĝi povus malbone influu la ekzistadon de ET.

Konsiderante, ke la nuraj kostoj de papero kaj afranko estas jam ĉ. 10 svisaj centimoj por unu numero, oni konstato, ke ni ne plu povos liveri ET tiel malkare kaj parte kun prezo, kiel

ni faris ĝis nun al la malbonvalutaj landoj. La prezo de 0.06 dolaro resp. 0.30 svis. fk., kiun ni fiksis por la bonvalutaj landoj, devas esti atingata iom post iom ankaŭ por la malbonvalutaj. En normalaj cirkonstancoj, ĉe ne tro altaj rabatoj konsentotaj al revendistoj kaj ĉe 4—5000 abonantoj, tiu ĉi prezo sufiĉos por garanti la daŭran ekzistadon de la ĉiusemajna Esperanto-jurnalo; sed ĝi estas la minimuma prezo, kiun oni bezonas.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu abonanto konsentos kun nia vidpunkto kaj sekve kun la novaj kondiĉoj sciigataj en la hodiaŭa numero. Ĉiu — kiu rekonas la ĝisnunajn klopodojn de ET kaj la dezirindecon de ĉiusemajna Esperanto-jurnalo — certe restos fidelaj al ĝi!

Esperu ni, ke la nuna krizo baldau ĉesu!

Kun nova espero kaj venkema kuraĝo eniru ni la novan jaron, kiu alportu al ĉiuj popoloj — ankaŭ sur ekonomia kampo — la delonge sopiritan pacon kaj al ET la nombron da abonantoj bezonotan por daŭra ekzistado!

Teo Jung.

3-a Radiotelefona Esp. parolado en Moskva.

De la Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo ni ricevis lastahore la sekvantan informon: (La pli frua apero de la ĉi-jena numero ebligas al ni ankoraŭ publikigi la komunikadon.)

La Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo sciigas vin, ke la 31. decembro de nuna jaro je la 14.15 hor. (laŭ meza Eŭropa tempo) okazos (3-a eksperimento dum nuna jaro) Esperanto-Radio-Telefon-Parolado ĉe la plej potenca radio-telefon-stacio en Moskva. Radio-ondoj povas esti akceptataj laŭ jam okazintaj eksperimentoj en tuta Eŭropo.

La raporton faros Prezidanto de C.K.S.E.U. E. Drezin pri la temo:

„Nuntempa financa situacio de S.S.S.R. (Unuiĝo de Sovetaj Socialistaj Respublikoj)“.

Bonvolu pri ĉi tiu grava okazintaĵo informi en via jurnalo kaj petu, ke ĉiuj aŭskultontoj la raporton nepre sciigu nin laŭ adreso:

Rusujo. Moskva. Mjansnickaja strato-Radiouzel al inĝeniero Papkeviĉ.

De la nombro de informontoj dependas estontaj Esperantaj Radio-Telefon-Paroladoj.

Estas ankaŭ dezirinde repressi ĉi tiun anoncon en naciajn tagjurnalojn kaj sendi specimenojn laŭ suprenomita adreso.

Centra Komitato de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo.

Sekretario de C.K.S.E.U.
V. Polakov.

Finbilanco pri la Dekkvina.

Sufiĉe malfrue, plurajn monatojn post la kongreso, la LKK povas fine prezenti siajn raportojn kaj bilancon pri la XV-a. Sed ĝis la lasta tempo okupite ankoraŭ pri rilataj korespondadoj kaj negocoj, ni petas pardonon pro la nevola malfriŝo. Nun, fininte feliĉe ĉiujn laborojn kaj disiginte la kongresoficejon, ni prenas lastfoje la parolon al koncza resumo.

Kiam la Nürnberg-Fürth-a Esperanto-Kartelo en Helsinki kuraĝe saltis en la breĉon, invitante al la mondforma urbo de Sachs kaj Dürer, ĝi promesis brilan kongreson, esperante la lojalan apogon de ĉiuj instancoj. Sed jam la unua alvoko, dissendita ĉiunorden, trovis nur heziteman eĉon, kaj nia nürnberg propaganda numero eldonita de ET rompis nur malrapide la glacian. La kotizotabelo, starigita ĉefe laŭ la XIV-a kaj interkonsente kun KKK, estigis la malplaĉon de multaj, kiuj konsideris ĝin ĉu postulema, ĉu neproporcia, kvankam tiu reguligo sole garantiis la certigon de la budĝeto por la unuaj monatoj. En

januaro okazis la Ruhr-okupacio kaj sekve de ĝi grava politika krizo en Germanujo, kiu malfavore influadis ankaŭ la kongreson. Denove hezitis multaj eksterlandanoj aliĝi, timante malagrablaĵojn, eĉ malokazigon de la mondfesto. La LKK penadis laŭforte per leteroj kaj artikoloj forigi la dubojn, atentigante pri la pacema kaj malŝovinista loĝantaro de Nürnberg kaj la afabla sintenado de la Esperantema urbestro, kiu promesis konsiderindajn favorojn por la kongresanoj. Sed laŭ la fimigaj informoj de la naciaj gazetaroj la plimulto de la Esperanto-jurnaloj bontrovis ne repressi niajn oficialajn cirkulerojn kaj publikigis eĉ avertojn pri gravaj malagrablaĵoj ĉe eventuala vojaĝo al Bavarujo. La akcepto de la honora prezidanteco flanke de la regnestro Ebert kaj la kuraĝiga invitiokirkulero de la germana ministro Oeser al la enlandaj registaroj pliboniĝis iomete la situacion, sed la pliakriĝanta Ruhr-konflikto estigis novajn dubojn, forimigante multajn kongresemulojn. Venis al tio, ke eksigitaj Ruhr'anoj interdume forte estis incitintaj la publikan opinion, kaj kiam ankaŭ la ĝis nun tute favora loka gazetaro pasie kontraŭbatalis ĉian partoprenon de francoj kaj belgoj en la kongreso, la LKK vidis sin subite en tre fatala situacio. Atakite parole kaj fare, publike kaj private, ĝi konsideris fine kiel sian devon sincere informi la KKK-on pri la okazintaĵoj, kiu nun eksanceliĝis ĉu fari kongreson ĉu ne, kaj eĉ balotigis siajn anojn. Aliflanke la LKK laborinte ses monatojn kaj fante jam gravajn kontraktojn tute ne ŝatis malokazigi la kongreson, des malpli ke ĝi povis garanti al ĉiuj aliaj eksterlandanoj senĝenan restadon. Malgraŭ la multaj pasportaj malfacilaĵoj, pri kiuj ni, bedaŭre senfrukte, intertraktis, plimultiĝis la aliĝoj en la lastaj monatoj de tago al tago, nelaste el Anglujo, kiu ja ĉefe financigis la kongreson.

Nu, la XV-a okazis kaj bone sukcesis, nelaste dank' al la nobla sintenado de niaj francaj kaj belgaj samideanoj, kiuj bondiscipline rezignis la partoprenon kaj certigis tiamaniere sentultan daŭrigon. Ofte kaj sincere oni bedaŭris ilian foreston, kiu sole omburmis la ĝeneralan festoĝojn. Bonkonsciencie la LKK povas konstati, ke ĝi lojale kaj ĝislaste faris ĉion por ebligi ankaŭ al la nomitaj landanoj almenaŭ delegitaran partoprenon. La oficialaj instancoj senrezerve rekonis ĉi tiun fakton, kaj por forigi la lastajn eble ekzistantajn dubojn ni permesas al ni ĉiuj leteron de s-o Chavet, ĝeneralsekretario de KKK, kiu skribis nelonge antaŭ la kongreso i. a.: „... Mi scias kaj solene atestas, ke vi faris ĉion eblan kaj neeblan, malgraŭ la gravaj malfacilaĵoj kaŭzita de la publikaj aferoj, por ebligi tiun ĉeeston kaj ke fine, venkita de la cirkonstancoj, vi devis konfesi la neeblecon de tiu ĉeesto, kiu povus kompromiti ne nur la sukceson de la kongreso, sed ankaŭ la ĝeneralajn interesojn de nia movado. Se do vi ricevas kelkajn nemeritajn kritikojn aŭ riproĉojn pro tiu ĉi afero, mi permesas al vi, uzi tiun ĉi leteron, eĉ publike por vin defendi...“

Ne estas afero de LKK paroli detale pri la pli-malpli sukcesaj aranĝoj, prezenti al la festanaro. Okazis ja diversaj maloportunaĵoj kaj ĉagrenajoj, ne mirigantaj tiun, kiu scias la nekompareblajn malfacilaĵojn, sub kiuj suferis nia XV-a pli multe ol iu antaŭa kongreso. Sed laŭ multaj afablaĵoj leteroj kaj gazetraportoj, alvenintaj al ni, la kongresanaro estis laŭŝarpe kontentigita, rekonante bonvole la laboron de LKK kaj akcentante la gastaman akcepton en la kongresaj lando kaj urbo.

Cifere la nürnberg kongreso estis la plej granda el ĉiuj niaj ĝisnunaj jarfestoj. Aliĝis en tute 4965 kongresanoj el 40 landoj laŭ jena statistiko:

Eŭropaj landoj:

Anglujo	149	Ĉeĥoslovakio	430
Aŭstrio	348	Danujo	21
Belgujo	11	Danzig	10
Bulgarujo	76	Estonio	60

Table with 3 columns: Country, Value, Value. Includes Finlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Jugoslavio, Katalunujo, Latvio, Litovio.

Ekstereŭropaj landoj:

Table with 3 columns: Country, Value, Value. Includes Ameriko (Usono), Kanado, Meksiko, Argentino, Nordafriko, Egiptujo.

Enspezoj:

Table with 3 columns: Category, Value, Value. Includes Kotizoj, Donacoj, Blindula kaso, Vendejo, Kongresaranĝoj.

Elspezoj:

Table with 3 columns: Category, Value, Value. Includes Spezoj, Presaĵoj, Afranko, Salajroj, Kongresaranĝoj, Propagando, Profito.

La akto pri Nürnberg estas fermita. Dankante la montritan de la Esperantistaro konfidon la LKK demetas per tio sian oficon. Postvivu la XV-a en la rememoro kiel kongreso, kiu havas bonan lokon en la historio de Esperanto!

D-ro Richard Ledermann, prezidinto de LKK.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktualaj, fidindaj kaj kompleta informaro, ni bezonas sciiĝojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj privataj sciiĝoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Estonio.

Laboristaro.

En Tallinn (Reval) estas fondita „Laborista Esperanto-Societo“, celante esp. propagandon inter la laboristaro. La nova societo estas gvidata de l' lokaj SAT-anoj. R. L.

Francujo.

Grava sukceso en Paris.

La lernejo de alta komerca instruado por fraŭlinoj en Paris, privata lernejo aprobita de la ŝtato kaj direktata de l'ino Saŭna, enkondukis devige la instruadon de Esp. post provo de nedeviga instruado.

Tri kursoj en Orléans.

Perpignan. Fondiĝis la 15. dec. 1923, Esperantista societo „Amika Rondo“ kiu celas organizi koncertojn kaj reprezentadojn de teatraĵoj. Sekcio de „Amika Rondo“ intencas ankaŭ prepari propagandajn paroladojn kaj fari propagandon en la literaturaj kaj artaj medioj. La adreso de „Amika Rondo“ estas: 5 Rue de la Savonnerie, Perpignan (Francujo).

Germanujo.

Rastatt. La 29. 11. enkondukis instruisto Gerstner el Raudental (apud Rastatt) 25 ĉeestantojn, laboristojn kaj lernantojn, en la utilecon kaj gravecon de nia lingvo. Ĉiu aliĝis je komencanta kurso.

Pere de SAL la 6. 12. 23 okazis la unua instruverspero de la nova kurso kun 40 kursanoj. Ĉeestas socialistaj laboristaj gejunuloj el Rastatt, pli maljunaj laboristoj, lernantoj el popol- kaj mezlernejoj. (Instruverspero ĉiufunde en la muzeo-restoracio tie je la 19h¹⁵ a. horo.)

Freiburg i/B. En la popola altlernejo funkcias kurso kun 25 partoprenantoj. Docento estas s-o Frz. Döring, del. UEA.

Progresoj de la radio-tekniko.

De Ing. V. J. Bajenov.

El rusa lingvo tradukita de A. Hajkis.

(Finio.)

Originala estas ankoraŭ unu utiligo de radiotelegrafo — la amerika departemento de higieno organizis sur tuta vico da marbordoj, radiostacioj, komunikantaĵoj kun ŝipoj, la dekorado de kuracistoj, kiuj donas radiotelefone konsilojn al la malsanuloj, troviĝantaj en vojaĝo meze de oceano sur la ŝipoj ne havantaj konstantajn kuracistojn.

Estas konataj okazoj kiam oni feris eĉ operacion sur la ŝipo per helpo de la radiotelegra konsilo de kuracisto de marbordo. Kiel la lastan eltrovon estas necese montri la instrumenton, kiu permesas al kuracisto, troviĝanta en sia laborĉambro, aŭskulti la koron de malsana pasaĝero, kiu trovas sin meze de la Atlantika oceano.

Estas ankaŭ ilo, per kies helpo mutulo povas interparoli kun blindulo.

La signifo de la radiokomunikigo en la vivo de mara kaj aera ŝiparo, kie la radiotelefono estas la unika komunikilo inter la ŝipoj kaj kun la tero, estas tiel memkomprenebla, ke ĝi ne bezonas pluajn klarigojn; nun la ŝipoj naĝantaj sur la Pacifiko havas la eblon radiotelefonari al la ŝipoj, troviĝantaj (en certa distanco) sur Atlantiko. En ĉiuj kajutoj de 1-a klaso de unu el la plej novaj oceanaŭ vaporŝipoj estas starigitaj radiotelefonoj.

Estas prilaborita la demando pri la rekta radiotelefonta interparolo el la kajuto de aerŝipo kun la abonanto de la ordinara draĵo linio.

Ciuj pli ampleksa fariga utiligo de radiotelefono ankaŭ kiel radiokompono — montriĝo de loko de mara aŭ aera ŝipo dum nebulo, nokte ktp. Nur sur la atlantika bordo de Norda Ameriko troviĝis en 1920-a jaro 29 tiaj radiokomponaj stacioj; pli ol 15000 da marŝipoj uzis ilian helpon (la stacioj sur la marbordo observis la signalojn, sendatajn de la ŝipo), kaj de la momento de forsendo de la signalo el la ŝipo ĝis la momento kiam ĝi ricevis per radiotelefono de la marborda radiokompono la sciiĝojn, kie la ŝipo troviĝas, pasadis meze 3,1 da minuto. Kaj por la aeraj ŝipoj tiujn direktantajn radiostaciojn oni speciale

En- kaj eksterlanda statistiko:

Table with 2 columns: Category, Value. Includes Germanujo, Ekster Germanujo, Entute.

El tiuj ĉi aliĝintoj ne petis personoj siajn kongresdokumentojn 1497 kongresanoj, do partoprenis efektive 3466 personoj, ne kalkulante multajn familianojn kaj honorajn gastojn.

Kun speciala kontentigo ni fine konstatas, ke la kongreso, kvankam ĝi trovis nek registaran, nek landan, nek urban, nek landligan subvenciojn, ne postlasis deficiton, sed fruktigis eĉ la konsiderindan supergajnon de ĉ. 200 anglaj funtoj sterlingaj. Estis tio ebla dank' al la eksterordinara ŝparemo de LKK kaj dank' al la sperto kaj lerteco de nia financestro, s-o Höhnigsberger, kiu per plej zorgema administracio kaj celkonscia utiligo de la kotizoj certigis la ĝojigan rezulton:

Lekcioj.

Moskva. K-do Kondratenko faris raporton pri Esp. dum someraj kursoj ĉe Ljezda Partia Lernejo por instruistoj. La raportoj interesis aŭskultantojn.

Tveri. K-do Varankin en klubo ĉe fabriko „Tensisto“ faris lekciojn: „Esperanto, kiel rimedo de internacia revolucia propagando.“ La lekcio havis sukceson. Samtempe en la klubo estis organizita Esp.-ekspozicio, kiu tre interresigis laboristojn.

Vitebsk. Dum komunaj kunvenoj de profesiaj unuigoj k-do Šaber faris kelke da lekcioj pri Esp. La lekcioj alifirde de fabrikoj multajn laboristoj, kiuj vive interresigas pri la internacia lingvo.

Kursoj.

Vitebsk, 26. 7. 23. Estas malfermitaj kursoj de Esperanto en ĉelo de SEU ĉe la klubo „Profintern“.

Voznesensk (Odessa gub.). Dum majo de 1923 ĉe laborista klubo estas organizitaj Esp.-kursoj, kiuj ricevis monan kaj moralan subtenon de loka Profesia Administracio.

Esperanto en lernejo.

Kiev. En provizoran lernan planon de Kiev-a lernejo de poligrafia produktado Esp. estas enigita kiel helpa lingvo por lerno de alilandaj alfabetoj.

Ĉelabinsk. Pedagogia Kunveno donis konsenton por enkonduko de Esp. dum la 1923-24 lernjaro en lernejo „Gornjak“ kaj urban lernejojn de 2-a grado.

Diversoj.

Moskva. En la klubo de la politikaj elmigrintoj k-do Lucien Revo, korespondanto de „Humanité“, faris esperantlingvan raporton: „Fascismo, ĝia deveno, esenco kaj perco.“

Sovetlanda Esperanto-Servo.

Gazetaro.

Lõuma Eesti, Waigas, 5. 12. pri Eduk. Intern. Esp. Eesti Politiseleht, Tallinn, 24. 11. Trad. pri alv. de Pozn. polic.

Päewaleht, Tallinn, 6. 11.

Revista Industrială, București, okt. Represo el „LK“.

New Jersey Post, Town of Union, 27. 10. Tre det. art. pri la polikongreso en Wien.

Scienco.

Klimatologio kaj Esperanto.

Rimarkinda estas la pliiganta uzo de Esperanto en la scienco. D-ro M. Toplanski en Wien skribis antaŭ la granda tertremo en Japanujo originalan artikolon en Esperanto pri la metodoj de la klimatologia esplorado. La direktoro de la Centra Observatorio de Meteorologio en Tokio iniciatis la represon en originalo en la ĵurnalo de la Meteorologia Societo de Japanujo. Oni apudmetis la japanan tradukon faritan de s-o Prof. K. Nakamura, eksdirektoro de la nomita observatorio.

Kun intereso oni legos tiun ĉi fakton kaj uzos ĝin laŭlece.

Ni gratulas tiel s-on d-ron Toplansky kiel Prof. Nakamura por tiu ĉi sukceso kaj praktika aplikado de Esperanto. Red.

Kosmologio.

Francujo. — En 19. nov. kunsido de Scienca Akademio de Parizo oni preparolis novan metodon, kiu ebligas determini per tuja kaj preciza maniero la lokon de ĉiuj sismaj skuoj (terremoj). La procedo konsistas el speciala kunarango de senfadena telegrafilo kaj sismo-grafo. Ĉi tiun eltrovon oni ŝuldas al s-o Rothé el la franca Universitato en Strasbourg.

Usono. — Amerikaj ĵurnaloj anoncas el Dayton (Ohio) ke pluraj aviadistoj faris tie interesajn eksperimentojn pri laŭvola okazigo de pluvo. Ili sukcesis, oni diras, surversante la supran parton de nuboj per elektrigita sablo, faligi pluvon kaj fordirigi vastajn kaj dikajn nubojn, kiuj tiele solviĝis iom post iom je pluvo.

A. E. en Nancy.

konstruas laŭlonge de la vojo de kutimaj flugvojoj de pasaĝeraj aerŝipoj.

Krome oni utiligas radiotelefonon ankaŭ por transsendo de precizaj signaloj de tempo (provo de horloĝoj), meteorologiaj bultenoj kaj sciiĝoj pri la probabla vetero kaj por difino de longitudo ktp.

Dum la lastaj 2-3 jaroj multe disvolviĝis, dank' al la samaj „revolucionistoj“ de radio — katodaj lampoj — la tekniko de radioaparatoj en la ordinara, draĵa telefonio kaj telegrafo. Utiligante tiujn ĉi lastajn perfektigojn, estas eble, ekzemple, konduki sur iu ajn unuopa draĵa linio ĝis deko da interparoloj samtempe; tiel en Germanujo la abonantoj de du urboj interparolante helpe de ordinariaj laborĉambraj telefonaj aparatoj, ofte mem ne suspektas, ke ilia parolo estas transdonata el la centra stacio de unu urbo al la samspekca de la alia per helpo de radioaparatoj.

Estas vere, ke ankoraŭ multe da fazoj devos transiri la radiotekniko antaŭ ol venos la solvo de la problemo pri elektrigo — sendraĵa transsendo de energio en industria grado. Sed la demando pri la direktigo de mekanismoj tra spaca grado estas solvita en valora grado jam nun, almenaŭ en la laboratoriaj kondiĉoj.

Kun la plua sukceso en tiu ĉi sfero la homaro ricevos novan ireege valoran ilon, ankoraŭ pli multe aŭtomatiganta la laboron kaj anstataŭanta la penon de homo per la energio de elektrika fluo. Kaj ne estas malproksima la tempo, kiam la direktanta kaj reguliganta centro de tiu ĉi forto, havante nenian materialan lignon kun la mekanismoj, plenumantaĵojn senpere la lokan laboron, samtempe observos kaj direktos ilian laboron!

Beleco rilate al la seksoj.

Estas kurioza kaj rimarkinda fakto, ke la civilizacio emas al inverso de sekso beleco, kiu — anstataŭ esti elmontrata en la ne-ina sekso — troviĝas en la ina. Inter la civilizitaj rasoj la beleco estas ekskluzive ina atributo.

La viro estas eble bela laŭ sia propra vidpunkto, kaj la simetrio laŭkorpe kaj perfekteco laŭ fizika disvolvigo montras ion, kio allogas ne nur la sameksanon, sed ankaŭ la alian sekson. Neniu parolas pri „bela viro“. Ĉu ne pri la beleco de la ino la pentristoj, poetoj kaj fabelistoj uzas ĉiujn povojn de ilustrado kaj priskribado? Malbeleco de viro neniel lin malhelpas allogi la alian sekson. Multaj nebelaj viroj estas nekontraŭstareblaj je virinoj; kaj neniu

viro mankas edzinon por malbeleco. Sed malbeleco de virino estas vera katastrofo.

Vizito al iu zoologia ĝardeno evidentigas, ke la beleco ĉe la bestoj estas preskaŭ senescepte elmontrata en la ne-ina sekso.

Tiu ĉi inverso havas pli profundan signifon ol ni imagas. Ĉu ĝi ne klare montras, ke la ina principo de la universo pli kaj pli evidentigas; ke la emo kaj aspiro por la beleco pligrandiĝas; ke la maldelikataj virseksaj kvalitoj plimalgrandiĝas?

Eminentaj sciencistoj nun konstatas, ke la ina estas la vera sekso, ke la virseksuloj estas nur replenkreskulinaj. Tamen virinseksuloj ne ĉiuj posedas inajn kvalitojn.

Rimarkinde estas, ke la rezultato de la lasta denombro montras, ke naskiĝas pli da inoj ol ne-inoj; ke en la kamparo kaj inter la montoj kaj valoj, kie la natura beleco regas, pli da inoj naskiĝas ol ne-inoj. Kontraŭe, en la grandaj urboj kaj fabrikiĝaj distriktoj la ne-inoj plivivendigas.

Richard Pryss Griffiths.

Pri la rido.

Pri la demando, pro kio la homo ridas, oni jam en la antikveco cerbumadis kaj provis trovi kialon. La malnovroma verkisto Aderisus starigis jenajn tezojn: Kiu ridas „a“, estas sincera kaj bonfidema; la enuomulo ridas „e“ aŭ mallongan „i“; kiu kunligas „a“ kun „o“, estas kuraĝa ĝis malmodesteco; kiu ridas helan „o“, estas donacema; sed je „u“ oni ekkonas avarulon kaj hipokritulon. Inter personoj, el kiuj unu aŭdas ridante „a“ kaj „o“, la alia „a“ kaj „i“, ekzistas simpatioj; ili havos, se ili estas diversseksaj, bonan edzcon. Dikaj, grasaj personoj ridas pli laŭlece ol malgrasuloj. Timinda kaj danĝera estas tiu, kiu neniam ridas. Maltecon kaj malamikemon montras la subpremata rido, kiu ŝajnas ne elveni el la interno, sed tie bruleti kiel subtera fajro.

J. B.

Subtenu la oficialajn instituciojn!

Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Medicino.

Nova maniero kuraci tuberkulozon.

En urbo Vinnici (Podolska gubernio) mal-sanulejo tre sukcese aplikas novan manieron kuraci tuberkulozon. Per speciala aparato oni trapikas la bruston de l' malsanulo kaj post tio enblovas puran azoton en internan spacon. Infektiĝita de tuberkulozo la pulmo kunfiriĝas kaj ĉesas funkcii. Post la injekto la tuberkulozaj baciloj trafitaĵ de la azoto pereas. Iom post iom, la enigita azoto forlasas la korpon, kaj la malsana pulmo ekfunkcias. Aplikante la manieron kelkajn fojojn dum duonjaro, oni ricevas mirindajn rezultatojn. La infektiita parto de pulmo defalas kaj oni ĝin forigas per malsekaĵo. La sana parto tute resaniĝas kaj cikatriĝas.

P. Poniŝevskij, Kiev.

Tekniko.

La plej granda ŝipo de la mondo.

Konate estas, ke la plej granda ŝipo kiu ĝi nun ekzistas estis konstruata en la ŝipfarejo de Hamburg kaj portis la nomon Bismarck. Nun oni anoncas el Londono ke la Sudafrika Ŝip-kompanio konstruiĝas novan ŝipon, kiu multe superas tiun supre menciitan ŝipon. Tiu ŝipo grandegulo konstruiĝis en Belfast, ĝi estas movata per Diesel-motoroj kun dudekmil ĉeval-povoj. Ne nur la plej granda, sed ankaŭ la plej rapida ŝipo ĝi estas.

Jozefo Major.

Genia eltrovo.

La „Reichsanzeiger“ en Berlin, oficiala publikigilo de la respublikaj institucioj, konigas interalie eltrovon de berlina instruisto Georg Schulkowski, kiu ankaŭ intereso la Esperantistaron, speciale niajn blindajn gesamideanojn. La eltrovo estas same interesa de la vidpunkto teknika kaj fiziologia, eblicante novajn enrigardojn en diversajn spiritalajn funkciojn. Temas pri nova maŝino, kiu estas legonta al la blindulo presliteraron ekz. gazejon per klara kaj aŭdebla homa voĉo. Tio kio do ĝis nun estis perceptata kiel nura spirita funkcio — la diferencigo de la literoj kaj ĝia lingva alformigo — hodiaŭ sammaniere estas ebla al maŝino. La okulo de la maŝino do povas ekkloni la unuopajn literojn kaj transformi ilin en la lingvon, kaj tio okazas tuj, sen ekzercado, ĉar ĝi posedas por tio la necesajn organojn, kiuj ĉe la homo evoluigigas kaj formigas nur per multjara kaj celkonscia ekzercado. La eltrovo plue ŝajnas esti destinata alkonduki esencan transformiĝon en la tipa preso, ĉar tuj ĉi maŝino same kapablas aŭtomate multobligi skribmaŝinajn manuskriptojn.

La eltrovinto serĉas por tiu ĉi maŝino kapitalpartoprenon. Tiu, kiu deziras detalojn, turnu sin en Esperanto al la eltrovinto mem: Berlin SO 26, Adalbertstr. 76.

Radiotekniko.

Amerikanoj konstruos senfadenan telegrafon en Ĥinujo.

Washington. — Kontraktoj nun estas faritaj ĉi tie por la plej granda senfadena stacio en la mondo, kiun oni konstruos en Shanghai kaj kiu malformos la unuan rektan komunikadon inter Ĥinujo kaj Usono.

La ĉefa stacio estos en eksterurba parto de Shanghai. Ĝi konsistos el sep turoj kun alteco de 1000 futoj. Alivorte, ĉiu turo estos pli alta ol la Eiffel-turo en Paris. Ĝi havos potencon de 1000 kilovatoj, kapabla de rekta komunikado kun Usono kaj aliaj ĉefaj senfadenaj stacioj de la mondo.

Samtempe, kvar aliaj stacioj estas konstruataj ĉiu kun potenco de 600 kilovatoj — en Pekin, Canton, Hankow kaj Harbin. Aliajn staciojn starigos laŭ trovon de la registaro de Ĥinujo.

Kompletigo de la stacio daŭros 2 jarojn kaj kostos 4,620,000 da dolaroj, laŭ kontrakto kun la hina respubliko.

W. A. D., Cleveland.

Malfermo de Transatlantika Centrejo Radiotelegrafa en Warszawa.

La 17. novembro en ĉeesto de prezidanto de Pola Respubliko s-o Wojciechowski kaj multaj aliaj eminentaj-personoj estas solene malfermita kaj sanknigita la centrejo radiotelegrafa, kiu kunigas senpere Warszawa kun New-York.

Tiu ĉi stacio estas unua el 7 plej grandaj stacioj radiotelegrafaj en la mondo.

Dum la solena prezidanto Wojciechowski malfermis la stacion, sendante la depeŝon al prezidanto de Usono. Post unua horo alvenis per tiu ĉi vojo de s-o prezidanto Coolidge respondo al s-o Wojciechowski.

N. P.

Internacia trafiko.

Aŭtomobilo por centdek pasaĝeroj.

El Londono oni anoncas: En la aŭtomobilekspozicio en la Olimpiko oni ekspozis aŭtomobilon por cent dek pasaĝeroj. La karoserio estas provizita per plej moderna lumo. La granda veturilo havas ses radojn, tamen ĝi povas traveturi la plej mallarĝajn stratojn kaj turniĝi ĉe la plej mallarĝaj lokoj. La pavimon ĝi malpli foruzas ol la kvarradaj aŭtomobiloj. La londona polico ankoraŭ ne permesis la veturadon de la aŭtomobilo-monstro sed oni ankoraŭ esperas tion.

Nepe ĝi signifas gravan progreson en la moderna aŭtomobilekspozicio.

Jozefo Major.

Agrikulturo.

Rikolto-deficito en Baliko.

La pluvriĉa somero, nememorebla dum lasta duonjarcento, kaŭzis al la terkultivistoj de la balikaj landoj grandajn damaĝojn. La preskaŭ ĉiutaga pluvado multloke malhelpis la sekigadon de l' fojno, kies rikolto multloke estis pereinta sur la superakvigataj herbejoj. Tium malfeliĉon sekvis la aliaj. La troa malsekeco kaj akvigado de l' grenkampoj pereigis certan parton de l' rikolto ankoraŭ dum grenmaturigo kaj marĝinis multajn terpomejojn. Multaj terkultivistoj estas senigitaj de siaj laborfruktoj kaj por ne morti por malsato bezonas ŝtatan subtenon. La rikolto-deficito kaj ĝia likvido okupas la registaron dum la barometro de la ekonomia vivo — la bazaraj prezoj senteble altiĝas kaj maltrankviligas la aĉetantaron pri la venanta vintro.

Konsiderante la ne tro firmajn ekonomian stacion de la novaj ŝtatoj, la ekonomian krizon kaj daŭran senlaborecon, precipe dumvintre, oni ne povas nei ke la lando staras antaŭ seriozaj skuigoj.

Ankaŭ la najbaran Latvion trafis la sama malfeliĉo kies damaĝoj superas 2 miliardojn. Kiel sciigas la gazetoj, la malfacila stato de agrikulturo tiom forte influas kaj komplikas la tutan ekonomian vivon de la lando ke la komerco kaj industrio suferas damaĝojn. Oni timas ke multaj entreprenoj ne travivos la krizon kaj bankrotos samkiel malpligrandiĝos konsiderinde la ŝtataj enspezoj.

R. L-son, Estonio.

Filatelio.

Germanujo.

En Germanujo aperis lastatempe div. poŝtmarkoj kun surpreso, kiu: por la malgranda eldono nun ne estas plue riceveblaj.

1. dentumitaj: 5 mil markoj sur marko de 40 Pf. oranĝa, 8 mil sur 50 Pf. verda, 15 mil sur 40 mk. verda, 20 mil sur 12 mk. skarлата, 20 mil sur 25 olivbruna, 20 mil sur 200 karmina, 25 mil sur 25 mk. olivbruna, 50 mil sur 10 mk. blua, 50 mil sur 200 mk. helblua, 75 mil sur 300 mk. verda, 75 mil sur 400 mk. verda, 75 mil sur 1000 mk. verda, 100 mil sur 500 mk. siringirola, 100 mil sur 400 mk. karmina, 250 mil sur 500 mk. verda, 250 mil sur 400 mk. bruna, 250 mil sur 1000 mk. karnruĝa, 800 mil sur 5 Pf. verda, 800 mil sur 10 Pf. verda, 800 mil sur 100 mk. verda, 800 mk. sur 200 verda, 800 mil sur 500 verda, 800 mil sur 400 verda, 800 mil sur 400 bruna, 800 mil sur 1000 verda, 2 milionoj sur 200 rozkolora, 2 milionoj sur 200 ruĝa, 2 milionoj sur 200 flava, 2 milionoj sur 500 verda, 2 milionoj sur 500 roz, 2 milionoj sur 5 mil rozkolora.

2. traumitaj: 400 sur 15 Pf. flavbruna, 400 mil sur 25 Pf. flavbruna, 400 mil sur 50 Pf. flavbruna, 400 mil sur 40 Pf. flavbruna, 2 milionoj sur 5 mil rozkolora. Krome aperis la sekvantaj ciferecseĝaĵoj 5 mil mk. blua-verda, 50 mil okra, 75 mil siringirola, 500 mil bruna, 1 milono mk. blua-verda, 4 milionoj olivo-verda, 5 milionoj rozkolora, 20 milionoj blua, 50 milionoj olivo-verda, 100 milionoj ĝizla, 200 milionoj olivo-bruna, 500 milionoj 1, 2, 5 kaj 10 miliardoj, plue grandformato 100 000 mk. ruĝa.

Administracia servo-marko kun surpreso „Dienstmarke“, 20 mk. siringirola, 50 mk. oliva, 40 mk. bluet-verda, 200 mk. karmina, 300 mk. verda, 400 mk. bruna, 500 mk. oranĝa. Kaj sen surpreso „Dienstmarke“: 5 mil sur 5 mk. brunflua, 25 mil sur 80 Pf. oranĝkolora, 75 mil sur 50 mk. violkolora, 100 mil sur 15 Pf. bruna, 250 mil sur 10 Pf. ruĝa.

La antaŭe eldonitaj poŝtmarkoj 5000 mk. kun „Wartburg“-kastelo, blua kaj 10000 mk. „Kölnener Dom“ (katedralo de Köln) olivo-bruna, estas elĉerpitaj de longe kaj tre serĉataj. La disdono de la surpreso-markoj al la poŝtuloj okazis laŭ diversa amplekso. Tial estas tre malfacile, kompletigi tutan serion.

Heinr. Lange, Syke b. Bremen.

Jugoslavio.

Aperis nova poŝtmarko 3-dinara, surpresita sur 15-paro-invalido-marko el la jaro 1921.

Br. R.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberejaj vortoj ktp. La redakcio tamen en prenas sur sin respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

245. Teknikaj terminoj.

La praktikistoj ofte renkontas malfacilaĵojn tradukante fakartikolojn aŭ korektante ilin. Kelkfoje li ja povas helpi sin per rigardo en la diversajn grandajn vortarojn, kelkfoje tamen li formetas ilin sen rezultato. Aŭ mankas la koncerna esprimo, aŭ li trovas diversajn esprimojn ĉu ne taŭgajn, ĉu ne internaciajn. Multaj tradukistoj simple uzas iun esprimon, ne pripensante la konsekvencon, kaj sekve de tio rezultiĝas konfuzo, kiu poste kraas plenan haoson, ke li serioze okupi sin pri la koncerna fakterminaro? Evidente! Kaj tamen ekzistas malfacilaĵoj kaj duboj, kiujn li nur povas forigi, interkonsiliĝante kun samkategorioj aŭ spertaj Esperantistoj. Tio estas speciale rilate al esprimoj, kiuj ne estas internaciaj. Ĉiutage renkontante al tiaj malfacilaĵoj mi citas nur du, kies uzintoj sendube ne esploris la problemon. Kiel modelon mi parolas pri ili tie ĉi kaj atentus la respondo de spertuloj el la koncerna sfero.

Mi legis la sekvantajn tradukojn por trade (france vent alizé), Passatwind (germ.), vento aliseo (it.), monzon (hisp.) = trado (laŭ angia radiko, uzata en pluraj sencoj), vento aliza (laŭ franca lingvo kaj idio), musono (? laŭ Boirac), monzono (laŭ hispana lingvo, sed kial kun z, kiu neniam estas sonanta en tiu ĉi lingvo?), senŝanĝa vento (laŭ Zamenhof). Nu, kion elekti el ĉiuj? Oni povus preferi la Zamenhofan, kiu enhavas la ĝustan sencojn; sed ĝi ne estas sufiĉe preciza por la tekniko. Sed kiamaniere solvi la problemon en la praktiko? La ekzemploj nur estas unu el la granda vico da ĉiam ripetigaĵoj. Same estas pri broadcast = brodkasto. Terura vorto en la orelo de germano, kiu memoras pri Brokostas = pankesto. Ĉu la traduko radiotelefono, radiotelefonala stacio aŭ stacio de senfadena telefonio ne estas sufiĉaj? Mi opinias ke oni ne solvas la problemon, simple enkondukante nacian radikon cetera malfacilaĵoj.

Kiu respondos?

Robert Kreuz.

247. Rilatas al n-o 200.

Ĉar iuj samideanoj rimarkigis ke mia paroleto pledas por principoj tro absolutaj kaj ke laŭ Zamenhof la triumfo de Esperanto dependos pli de sentimentalismo ol de ĝia perfekteco kaj riceco, mi demandas kion signifas la sekvantaj Zamenhofaĵoj?

„Krestomatio“ pĝ. 287:

„Krom plena neŭtraleco en rilato nacia, arta lingvo distingiĝas per la sekvantaj ecoj: 1. Ĝi estas mirinde kaj nekredible *facila por ellernado*; sen irrogandigo oni povas diri, ke ĝi estas almenaŭ kvindek fojojn pli facila ol ĉia lingvo natura“

Pĝ. 295: „2. La dua distingiĝa eco de lingvo arta estas ĝia *perfekteco*, kiu konsistas en matematika precizeco, fleksebleco, kaj senlima riceco.“

Pĝ. 295: „Krom tio ne forgesu, ke la perfektegado de lingvo arta estas ebla ĝis senfineco, ĉar ĉiun bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta hevas plenan rajtan, aligi al si, ĉian mankon, kiu povas troviĝi en ĝi, ĝi havas la rajton pibonigi kaj ŝanĝi“

Pĝ. 305: „Dume en Esperanto, „dank“ al la plena seninflueco de la gramatiko kaj dank al la regulo, ke ĉiuj vortoj „fremdaj“, kiuj iam de si mem estas internaciaj, estas uzataj senaŝange egale kiel en la aliaj lingvoj, — ne sole grandega multo da vortoj fariĝas tute senbezona por lernado, sed la lingvo ricevas la eblon disvolviĝadi eterne ĉiam pli kaj pli, sen ia dependo de la aŭtoro aŭ de ia Akademio.“

Prof. G. Meazzini, L. K.

Korekto.

En ET 158 ni publikigis la tre legindan raporton de la Prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato, reprezentita laŭ la kongres-raporto de Nürnberg. La originalo enhavas bedaŭrinde grandan nombron da preseraroj, kiujn ni korektas tie ĉi, ĉar ili povos kaŭzi grandajn erarkomprezojn.

En la 1a alineo, 5a linio, anstataŭ: akcelis = aludis, lasta kolumno, 1a alineo, piednoto, anstataŭ: pluaĵ klajzoj = pluaĵ klarigoj, 2a alineo, unua frazo, anstataŭ: la rezultaton = la ĝenerala rezultato, 4a linio, anstataŭ: definitiva regulado = definitiva rezultato, 4-a alineo, sub 1e: anstataŭ: novan tradukon de = novan radikon en, sub 2e: 4a linio, anstataŭ: malaprobis = arkaigo, lasta linio, anstataŭ: estas aliparta afero = estas aliparte afero de l' vortaristoj, kaj afero ofte tre delikata, 2a paĝo, 1a kolumno, 4a alineo, 4a linio, anstataŭ: samideana spirito = ĉiuj kun amika 3a alineo de malsupre, dua linio, post la vorta prezidanto oni aldonu: kelkfoje eraris; post la interliga streketo aldonu: tio, en antaŭlasta alineo, 8a kaj 9a linioj, anstataŭ: internacia = internacie la, kaj anstataŭ: neŝancela fideleco = neŝancebla fideleco; en la antaŭlasta linio, anstataŭ: nova = vana.

Alvoko.

En kunveno publika, okazinta la 10-an de decembro, je kiu partoprenis krom germanaj kaj eksterlandaj kompetuloj, ankaŭ jenaj organizitoj: Societo de la amikoj (kvakoroj), Internacia Ruĝa Kruco, Internacia Helpe Por-infana, la angla militistarmisio, la eksterlanda ĵurnalisto ktp. oni konstatis ke la normala sanstato de l' pleimulto de la ĉi tie infanaro estas ĉi tiu: „Malferme evoluita senforta korpo, nevoluita muskolaro, signoj de plue malsuĝita nutrado!“ Tro malfreue ni publikigis niajn petojn, ĉar nur devigataj per la mizeraj ĝenerala ni fine ekkurajis alvoki la bonkorecon de la eksterlandaj amikoj. Nun evidentiĝas, ke estas tro malfreue por disdoni la donacojn je kristnasktago! Pro tio ni prokrastis la aranĝon ĝis meze de januaro. Gesamideanoj, vi povas ankoraŭ helpi sendante ofertojn por la kompatindaj infanetoj malfeliĉegaj! Ni korege dankas por ĉiu eta donaco!

Neŭtrala Esperanto Societo Köln: Brakel, Junker.

Ni kordankante kvitanacas ankoraŭ al la sekvantaj pluj donacitoj: Ge-oz A. T. Torino 37 liroj, G. Cete 5 fr. fk., E. V. Wormerveer 5 h. guld. kaj samideanoj el Köln 10 bilionoj mk.

Esperanta Ligilo.

la lomo de niaj senvidaj gefratoj.

Estimindaj gesamideanoj, dum gaja novjarfesto, memorante pri la renoviĝo de la jaro, bonvolu ne forgesi pri la renoviĝo de via donaco al Esperanta Ligilo, plej grava beno por multaj el niaj senvidaj gefratoj.

Kordanke akceptas oferojn: Honora kasisto de Esperanta Ligilo, s-o W. P. Merrick, Woodleigh, Shepperton, England (Anglujo) aŭ la Redakcio de Esperanto Triumfonta, Horrem b. Köln.

Dankon.

Al samideano Julio Escarriaza el Bilbao, kiu en pasinta somero vizitis nin kaj nian nordan hejmvilaĝon, ni dankas kompene por plezurego, kiu ni aranĝis por venonta kristnaskfesto je ĉirkaŭ cent da milriĉaj popolernejaj lernantoj en nia vilaĝo.

Restado de s-o Escarriaza ĉe ni igis rimarkindan propaĝadon al nia ideo ne nur en nia vilaĝeto, sed en nia tuta lando, ĉar nia nacilingva gazetoj skribadis favore pri la eksterlandulo, kiu vojaĝadas per helpo de Esperanto. Eĉ oni sendis al ni numeron de finlingva gazeto aperanta en Usono, kiu ankaŭ publikigis kiel novaĵon el Finnlando la nomitan gastadon okazintan internacilingve.

Koren dankon por ĉio ĉi!

Vainö J. Pulkkinen, Svante R. Hautamäki, Reisingärvä (Finnlando).

Peto

al Centro de „Prepara Komitato por organizo de Esperantista Studenta Movado“.

Konforme al la decido farita dum la Studenta Kongreso en Nürnberg, la Studenta Fakgrupo de Hungarlanda Esp. Societo, kiel delegito por Hungarujo preterigis raporton pri la studenta Esperantista movado en Budapeŝt. La raporton ni sendis en oktobro al adreso transdonita de nia Nürnberg-berga delegito ing. kand. I. Fekete-Nagy (Studenta Esp. Unuiĝo, Berlin NW 52, Calvstr. 15 ĉe Gareis). Sed post kelke da semajnoj la letero revenis kun la rimarko, ke la tiolito translokiĝis ne postlasante novan adreson. Ĉar ni ne komprenas tiun longan silenton kaj aliparte jam estas tempo plej urĝe interriligi, ni petas nin informi pri la stato de nia afero aŭ pere de nia oficiala ET, aŭ per rekta letero. (Adr.: J. Máiřit, univ. stud. sekr., Budapeŝt I, Horthy Miklos ul 9.)

Ni petas laŭeble baldaŭajn respondojn.

Studenta Fakgrupo de HES, Budapest.

Katolikoĵoj

La „Aŭstra Katolika Ligo Esperantista“ Wien, anoncas per tio al ĉiuj gesamideanoj, ke ĝi aranĝos Esperanto-Diservon (sankta meso kun kantaj Esperantaj kaj prediko Esperanto-germana) ĉiun 5-an dimanĉon en la monato je la 10 h. antaŭtagmeze en „Italienische Nationalkirche“ (Itala Nacia Preĝejo) Wien I, Minoritenplatz. Ĉiuj gesamideanoj, precipe travojaĝantoj, estas kore invitej al la vizito de tiu aranĝo. (Grupkunveno ĉiumerkrede de la 5 ĝis la 7.30 h., vespere en Wien I, Kleeblatt 7. Sidejo: Wien I, Freyung, Schottentempel, prez. pasiro W. Neudwith.)

Varbu por ET ĉu abonojn! ĉu anoncojn!

Novaj abonprezoj.

La kompleta ŝanĝo de la cirkonstancoj en Germanujo, al kiuj ni jam plurfoje aludis, devigas nin, modifi la abonprezojn por multaj landoj. Sekve de tio ni publikigas tie ĉi la detalan tarifon, laŭ kiu ni fiksas egalvaloron de 0.06 dol. resp. 0.30 sv. fk. por bonvalutaj landoj 0.05 dol. resp. 0.25 sv. fk. por malbonvalutaj landoj (ankaŭ Italujo, Belgiujo kaj Francujo).

Prezo de unu numero:

Argentino	0,15 peso.	Japanujo	0,10 jeno
Aŭstrio	3000 kronoj	Jugoslavio	4 dinaroj
Belgiujo	0,95 franko.	Kanado	0,06 dolaro
Brazilio	0,40 milreĝo	Latvio	0,25 lato
Britujo	3 pencoj	Litovio	0,45 lido
Bulgarujo	6,50 levoj.	Nederlando	0,15 guldeno
Cehoslovakio	1,50 kronoj	Norvegiujo	0,50 krono
Danujo	0,85 krono	Polujo	0,25 sv. fk.
Estonio	0,25 sv. fk.	Portugalujo	0,25 sv. fk.
	aŭ egalvaloro.		aŭ egalvaloro
Finlando	1,50 marko	Rumanujo	12 lejoj
Francujo	0,85 franko	Rusujo	0,25 sv. fk.
Germanujo	0,25 or.-mk.	Svedujo	aŭ egalvaloro
(Poŝtab. monato)	1.— or.-mk.	Svisujo	0,50 franko
Hispanujo	0,40 peseto	Usono	0,06 dolaro
Hungarujo	1600 kronoj		
Italujo	1.— liro		

Anoncetoj

(ankaŭ en rubriko „Korespondoj kaj Interŝanĝoj“), nur akceptataj per minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas pro propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas prezon de 2.— markoj; prefera prezo por poŝtabonantoj estas 1,25 mk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 fk.), en „Internacia Komero“ la duoblo.

Dankesprimoj

La Esperanto-Fako de la „Deutscher Caritasverband“ Centrejo Freiburg i. Br., skribas al ni:

Estas efektive necese, esprimi nian sinceran dankon al ĉiuj, kiuj ĝis nun tiom multe helpis mildigi la sorton de niaj suferantaj infanoj! Apartan dankon ni ŝuldas al s-o K. Hell, supera inspektoro en Eger, al fino Fr. Forgon en Debreczen, al s-o E. Rolf en Arnau, al la Grupo Esperanto en Teischen-Bodenbach, al s-ino Isbrücker, 's-Gravenhage, Holando, al s-o A. N. Koopmans en Leeuwarden, al s-o A. Hansen en Aalborg, al Berna Esperanto Societo (D-ro Spielmann), al s-o Franz Ulbert, Direktoro en Karlsbad, al la Esperanto-Grupo Jägerdorf.

Speciale ni ankaŭ dankas ĉiujn gesinjorojn, kiuj instigis nin kaj faris praktikajn proponojn pro logiĝo de malbone nutritaj infanoj en eksterlando. Ĉar la mizero pli kaj pli kreskas, ni ankaŭ estonte estas dankemaj por ĉe plej malgrandaj donacoj, instigoj kaj favoroj de nia helpagado.

Deutscher Caritasverband,
(Germana Ligo de Kristiana amo)
Freiburg i. Br.

Helpu al la germanaj infanoj!

(Vidu la alvokon en la n-roj 167 kaj 168 de ET)

Por la L. G. Homberg (Niederrhein) de la G. E. A. prenas sur sin la taskon, zorgi pri la disdono s-o E. D esch, lernejestro, Homberg (Niederrhein), Feldstr. 21.

Por Mainz: Peter Becker, Augustinerstr. 56, del. UEA.

Malaltigo de prezoj.

Por akceli la disvastigon de niaj bonstilaĵoj libroj ni fiksas ĝisplue prefer-prezojn.

Bukedo, 1. volumo	0,60 sv. fk. aŭ
Malriĉa en spirito	0,50 ormarkoj
Bialystok	0,50 sv. fk. aŭ
Albanio	0,25 ormarkoj

inkluzive sendkostoj.

Utiligi la favoran okazon! — Mendu tuj ĉe

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“

Horrem b. Köln (Germanujo).

Ĉu vi amas arton kaj literaturon

? ? ?

Abonu tuj la revuon

„Literatura Mondo“

Andrassy út. 81 :-: Budapest VI.



La malnovaj abonantoj estas petataj renovigi siajn abonojn.

Ĉas-armiloj

Pistoloj, municio. — Objektoj por ĉesado

A. Zentgraf

Meiningen (Germanujo)

ZAMENHOFA TAGO POR ZAMENHOFA MONUMENTO.

Se 5000 Esperantistoj donacos ĉiu po unu ŝilingo, aŭ 10.000 po ses pencoj, ni havos la plenan bezonatan ŝumon por la monumento.

Ĉu tio estas tro granda postulo??

Organizu ĉie specialan monokolekton en la Zamenhova tago. Postulu la kupon-kartojn por vendi kaj sendu la monon al la Honora Kasisto W. M. Page, 31, Queen Street, Edin- burgh, Skotlando.

En la nomo de la Org. Kom.

J. D. Applebaum, Hon. Sec.
11, Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

Prezo-redukto!

Favorprezoj por libroj.

Taglibro de vilaĝpedelo Malriĉa en spirito.

Ĉiu libro kostas provizore nur 0,60 sv. fk. aŭ 0,50 or.-mk. inkluzive sendkostoj. Skribu tuj al

Butin & Jung, G. m. b. H.
Godesberg (Germ.) Bahnhofstr. 30.

Ĵus aperis:

AKBAR

Orienta romano de P. A. S. van Limburg Brouwer, tradukita de J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans, rekomendata de Esperantistita Literatura Asocio.

Prezo por bonvalutaj landoj 1,80 hol. guld. + afranko. Mendebla ĉe

J. R. G. Isbrücker,
v. Beverningkstraat 10,
's-Gravenhage, Nederlando.

Fundamenta prezo por malbonvalutaj landoj 3,60 or.-mk. Mendebla ĉe

Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Wilms-Strasse 5,
Berlin SW 61, Germanujo.

Anoncetoj.

AL ĈIJI MIJ AMIKOJ ĝoĝigan festotagajn kaj multan feliĉecon la nova jaro. Karl Minor, L. K., Hamburg (German.) nova adreso: Hallersstr. 6. [1]

VORTARO ESPERANTO-BULGARA de H. Baĉvarov, preskaŭ plena, bela eldono, pg. 252, kontraŭ 2,50 sv. fk. aŭ 0,5 usonaj dol. estas sendata de aŭtoro Haralambi Baĉvarov, gimnazia profesoro en Tirnovo, Bulgario. [2]

FILATELISTOJ! Konituŭ mendepono mi vendas nur unuaklasajn pm. de ĉiuj landoj. Malnovgermanujo, Eŭropo Transmaro, Kolonioj, maloftaj, novaĵoj ktp. je senkonkurencaj prezoj laŭ Yver-Tellier-katalogo. E. Gabelmann, Katharinenstr. 14, Freiburg i. Br. Germ. [1]

ESPERANTA MIGRANTA BIBLIOTEKO liveras al rusaj samideanoj plej abundan legmaterialon. Petu informojn de s-o K. Kolobaŝkin, Volovo — Livenskoje, gub. de Orel, 5 Lomigory, aŭ de s-o I. Sirjacov, Baklanka, gub. de Vologda. Por respondo nepre aldonu pm. [5]

KARAJ AMIKOJ! Mi estis vojaĝinta en Eŭropo kaj Afriko dum multaj monatoj. Mi transloĝiĝis al Paris. Mia nova adreso estas: Ilario Vászárhelyi, 30 rue de la Félicité, Paris 17e. Mi interŝanĝas pm. kaj pk. il. [1]

ATENTU! Du 20-jaraj lignajstoj serĉas okupadon en la eksterlando. Skribu al: Willi Lunz kaj Bruno Schlick, Nürnberg, Peter-Henleinstr. 50,4 Germanujo. [1]

RUSAJ GESAMIDEANOJ! Geparcento de D-ro Vinas Pietaris (Vikenty Petter) morinta 1902, en Ustinjna, Novgorod gub. serĉas lian familion, edzinon Marija Nikol. Petter kaj gefinan. Georgijo, Adolfo, Vikentijo, Antonio kun celo interkonatiĝi. — Eksciinte ĉiu bonvolu skribi al Kl. Naudzius, Mariampolė, poŝtrestante, Litovio. [1]

GRAMOFONDISKOJN Esperantistoj deziras aĉeti Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo. [1]

Korespondoj kaj Interŝanĝoj.

Juna balefistino, 23 jara, Lussi Walkowska, Ruslando, Bobruisk, Min-g. Socialistiĉeskaja 198, korespondas kaj interŝanĝas pm. ktp. Mi tre estas ĉiujn sendi novaĵojn modjurnalojn pri pelta vintra-sezono. 1923/24. [2]

Filatelistoj atent! Por 50 pm. vialandaj mi sendas la saman kvanton da mialandaj. Ne interŝanĝas germanajn, polajn kaj aŭstrajn. Mi deziras ankaŭ korespondi per il. pk. Josef Janda, Praha-Vyšehrad, Neklanova 24/2, Cehoslovakio. [2]

Koŝkie, Polio, z. Radomska, Bank dla Handu i Przemyslu, s-o T. Wierzejski, serĉas hodiaŭ interŝanĝitojn de pm. en ĉ. l. Krom Esperante mi korespondas pole kaj samkvalite. [2]

Mi volas korespondadi kun studentoj, precipe el Svedujo aŭ Danujo. Jonas Laužikas, Lkmergė, Valtisbyline 8 kl. Litovio. [2]

Fraŭlo L. Ley, studento, deziras interŝanĝi l. aŭ pk. kun samideanoj ĉiulandaj. — L. Ley, Wien 1, Universitat-student, Ring, vom 12. November, Aŭstrujo. [2]

S-o Gustav Sturm, Caransebes (Banat) Rumanujo, str. Spitalului 4, Rumanujo, interŝanĝas pm. kaj papermonon kun la tuta mondo. [2]

S-o Edgars Balins, desegnistino, en Riga, Gertrudes iela 28, 21 (Latvio) deziras korespondi kun tuta mondo per bonaj il. pk. kaj l. Al ĉiu eksteriropano sendos belan latvan il. revuon. [2]

Angloj kaj hispanlingvanoj atent! Mi deziras korespondi kun vi pri viaj naciaj lingvoj, precipe pri teknikaj esprimoj, interŝanĝi teknikajn gazetojn aŭ interŝanĝi artikolojn el ili (priskriboj de maŝinoj, virturiloj ktp. Mi ankaŭ interesigis je presarta literaturo kaj katalogoj pri produktaĵoj de plej diversaj fakoj. — Mi ĉiam respondos. — Seriozuloj bonvolu skribi al: s-o Alfred Enge, Püssneck, Thüring. (Germanlando) Altenburgweg 12. [2]

S-o Atanas Jamukov, instruisto, vilaĝo Dukmen, Kazal-agacko, Bulgario, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per l. kaj il. pk. same per stenografio Gabelsberger-Schramm. [2]

Fotografajojn pri Esperantistoj kaj famuloj kolektas s-o Aleksandro Vandro, Bucuresŝi, Romanujo, Informejo Cinema Select, Calea Viktoriei 48. Rekomencas per poŝtmarkoj aŭ poŝtkartoj laŭdezire. [4]

40—100 bonajn sovetaĵojn poŝtmarkojn mi sendos kontraŭ ĉiu nova bela modrevuo. Sendu rekomendite en fortika koverto, sciigante viajn dezirojn al s-ino P. Konovalova, Teatralnaja pl. 6, 9, Nijnji-Novgorod, Rusujo. [2]

S-o Milan Bijelić, Karlovac, Banja br. 8, Jugoslavujo, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Alfonso Cappellini, Firenze 4, Italujo, Via (bfl.) S. Lucia 6, deziras korespondi per il. pk. (bfl.) kaj interŝanĝi pm. [1]

„Lab. Esp. Grupo“ serĉas por siaj membroj kaj lernantoj, gekorespondantojn el ĉiuj landoj, Bonvolu skribi al: M. Schmitzer, Chaussée de Hensy, 78, Verviers, Belgio. [1]

S-o C. J. v. Sonsbeck, Wingerdstraat 19, Utrecht, Nederlando, deziras interŝanĝi il. pk. kun naturvidindaĵoj kaj pm. [1]

Filatelistoj! S-o Kazimierz Liniowski, poŝtoficisto en Zolkiew, Lemberg, Polujo, deziras interŝanĝi pm. kaj donas flajn de la Polujo, Danujo, Svedujo, kaj Litovio kontraŭ aliaj de ĉiuj landoj. [1]

S-o J. O. Saarinen, Forssa, Finlando, deziras korespondi kun ĉiuj landaj Esperantistoj. [1]

S-o A. Canninga, deziras ŝanĝi pm. kaj sportfotojn kun ĉiuj landoj. Adreso: Anjelersstraat 12, den Haag, Nederlando. [1]

„La sportfota domo“ en den Haag, Nederlando, Daltonstraat 98, ŝanĝas sportfotojn kun ĉiuj landoj. Speciale korespondas kun Kanado kaj Albanio. [1]

Librotentanto Ernst Dröm, Stenslund 56, Falun, Svedujo, deziras korespondadon per il. pk. pm. papermonoj ktp. kun la tuta mondo. [1]

S-o Pedro Juaréz Cano, stud. jur., Apartado 148, Santa Clara, Kubo, deziras korespondon kun samideanoj de la tuta mondo kaj interŝanĝon de pm., fotografajoj, pk. kun pm. bildflanke. [1]

Fraŭlo Johano Pogoreckis, 20 jara oficisto, Litovio, Panevezys, Marijos g. 52, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo kaj interŝanĝi per il. pk. pm., vidaĵoj, fotografajoj, Esperantaĵoj ktp. [1]

S-o M. Kueczarow kaj asocio, Studencka 55, Nieswicz, Polujo, deziras korespondi kun tuta mondo (precipe Grekujo, Bulgario, Norvegiujo, Portugalujo, Turkujo) per il. pk., interŝanĝas pm. kaj papermonojn. Tuj respondos. [1]

Pro multe da ricevitaĵoj, korespondantoj estas maleble respondi al ĉiu. Akceptu pro via afableco mian dankon! F-ino Helenjo Goldberger, Prešov, Cehoslovakio. [1]

S-o Josef Jaroš, Praha-Prosek, 61, deziras korespondi per il. pk. l. k. c. l. Ciam respondos. [1]

S-o E. Neuhut, 1 Ulive Obecnio ovara 802, Praha, Cehoslovakio, deziras korespondi kun fratinoj de la tuta mondo per il. pk. l. kaj interŝanĝon de pm. Ciam respondos. [1]

Dezirantaj kolekti pm. speciale por propagando de Esperanto samideano Szicz, Delegito de UEA, str. Warszawska 12, Radom, kaj samideano W. Kijak, poŝtisto, Radom, Polujo. [1]

Filatelistoj! Por 2 sv. fk. aŭ egala valoro mi sendas 30 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölplnitz i. Vogt., Bergstr. 5. [6]